# DIA REGNO

DIA REGNO

ISSN 0167-9554

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 3 (876) • 2009 •



## Ĉinaj gefratoj



2009年3月29日
星期日
第12期(总第760期)

苏州

SND

半年结出6项硕

中科院苏州医工所推介科研新品



狮山居民登上
国际世界语会刊



本报讯(懿芬)近日，狮山社区徐钟穆老师和他的10位世界语学员，拉着"我们热爱国际世界语协会"宣传标语的合照，被登在了世界教科文组织批准的国际世界语会刊《天国》杂志上。

2007年，徐老师在狮山社区开办了世界语免费培训班。目前，他的学生已有十几名，年龄最大的是一位50多岁的台籍人士。

横山社

Vidu la paĝon 63

**KELI**

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
🖂 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel Polnický;
🖂 Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;
✆ +420 325 615 651;
💻 Cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
🖂 Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;
✆ +49 7131 162688;
💻 siegfriedkrueger@arcor.de



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
🖂 Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
✆ +46 (70) 2004574;
💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).



***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***



**Ekspedado:** Pavel Polnický
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec


## ENHAVO


| | |
|---|---|
| Pentekosta prediko en Herberg | 51 |
| Jesuo kuracas | 54 |
| Komuneco | 56 |
| Nenian malbonon faru al vi | 59 |
| 40-jara KELI-sekcio en Ĉeĥio | 60 |
| Nia laboro ne estas vana... | 62 |
| Sekretaria jarraporto pri la jaro 2008 kaj ... | 64 |
| Tagordo por la jarkunveno 2009 | 65 |
| Financa raporto de KELI | 66 |
| Rezulto kaj buĝetoj | 68 |
| Inventuro de la noveldonita Biblio | 70 |
| Informetoj | 71 |
| Kiel akvo estas mi | 72 |


## REDAKTORAJ VORTOJ

Jen kelkaj neligitaj punktoj: unue mi bedaŭras la malfruiĝon de la nuna numero de Dia Regno. Baze la kaŭzo estas ke mi komencis novan laboron kaj pro tio devis translokiĝi. Do multe da kromaj taskoj antaŭ ol mi trankvile povis prilabori la DR:n.

Due mi volas danki pro la kontribuoj kiuj alvenis post mia "helpkrio" en la pasinta numero. Espereble vi daŭre sendos artikoletojn, kiujn mi povos publikigi en DR.

Trie mi tre ĝojas ke mi denove ricevis leterojn de niaj ĉinaj fratoj kaj precipe de Mu Binghua, de kiu mi nenion aŭdis jam de longe post la tertremo 2008. (vidu ankaŭ la paĝon 63).

Kvare – jam estas somero kaj atendas min la libertempo kaj la kutimaj esperantaj renkontiĝoj. Mi jam ĝojas denove renkonti multajn karajn ge-amikojn. Mi deziras al vi ĉiuj bonan someron kaj libertempon.

# Pentekosta prediko en Herzberg

Peter Bäss, DE

La graco de la Sinjoro Jesuo Kristo kaj la amo de Dio kaj la kuneco de la Sankta Spirito estu kun ni ĉiuj. Amen.

Karaj gefratoj en Jesuo Kristo alvenintaj el multaj direktoj de la mondo, benatan, ĝojigan antaŭvesperon pentekostan mi deziras al vi.

Kiam mia Nina havis 5 jarojn, ŝi iradis kun siaj gefamilianoj en ĉijare okazanta kermesa amuzejo, nomata novkolonjaj majaj tagoj. Kiam ni mallonge haltis antaŭ la enirejo de la fantoma trajno mi proponis tie amuziĝi. Tiam Nina kroĉiĝis forte al mia gambo kriante “fantoma trajno – ANGOR’!” Nu, mi atendis kun ŝi ekstere, ĝis la gefratoj traveturite revenis. Kion Nina faris? Ŝi terure timis fantomojn, serĉis protektanton kontraŭ ili kaj trovis sian paĉjon, kiu ŝirmu, kiu konsolu ŝin.

La Sinjoro, la Eternulo promesis laŭ Jeĥezkel meti Sian Spiriton en sian popolon, kaj fari ke ili agados laŭ Liaj leĝoj, kaj Liajn ordonojn ili observados kaj plenumados (Jeĥ 36,27). En la Evangelio laŭ Johano la Parakleto estas nomata la Sankta Spirito.

Protekti, konsoli, defendi – kion faras la Parakleto? Krome la Parakleto instruas nin kaj rememorigas nin pri ĉio, kion diris la Sinjoro. Kiel efikas la Sankta Spirito?

Provu ni tri okazaĵojn menciitajn en la Evangelioj por trovi respondon:

Iam Jakobo kaj Johano, disĉiploj de Jesuo, petis lin, doni al ili la du plej bonajn lokojn en la Dia Regno. Kiel ili komprenis, la Dia Regno baldaŭ alvenos. Se temas pri establo de regno, ankaŭ temas pri oficoj kaj pri distribuo de postenoj, ĉu ne? Ili emis estri kun la Sinjoro. Kiam la aliaj 10 aŭdis tiun paroladon, ili ekindignis kontraŭ la du. Konflikto inter la jesuanoj estis eksplodata. Kion fari? – Jesuo memorigas siajn disĉiplojn pri io de ili verŝajne forgesata: *“Jesuo alvokinte ilin al Si diris al ili : Vi scias, ke tiuj, kiuj pretendas regi la nacianojn, kondutas kiel sinjoroj super ili, kaj iliaj granduloj misuzas sian aŭtoritaton kontraŭ ili. Sed ne tiel estas inter vi; sed kiu volas grandiĝi inter vi, tiu estu via servanto; kaj kiu volas esti la unua inter vi, tiu estu sklavo de ĉiuj”* (Mark 10,42-44).

Ĉu same kaj egale rilatas la Sinjoro je Jakobo kaj Johano kaj je la 10 aliaj de Siaj disĉiploj?

*“La parakleto … vin rememorigos pri ĉio, kion Mi diris al vi.”* (Joh 14,26).

Pro etnaj kaj religiaj diferencoj samariaj vilaĝanoj rifuzis doni tranoktejon al judaj paskaj pilgrimuloj, kiuj pilgrimis tra ilia teritorio al Jerusalemo. Rifuzo de gastigado – rekta ofendo. Ĝi trafis Jesuon, kaj Li ne sole pilgrimis Jerusalemon. *“Kaj Liaj disĉiploj Jakobo kaj Johano … diris: ‘Sinjoro, ĉu vi volas, ke ni ordonu fajron malsuprenveni el la*

*ĉielo kaj ekstermi ilin?'* [Dank' al Dio ili ne havis la atoman bombon!] *Sed Li sin turnis kaj admonis ilin; kaj diris: 'Vi mem ne scias, laŭ kia spirito vi estas. Ĉar la Filo de homo venis, ne por pereigi animojn de homoj, sed por savi.' Kaj ili iris en alian vilaĝon"* (Luk 9,54-56). [Dank' al Dio tiuj disĉiploj ankoraŭ sekvis ilian majstron!]

Ĉu vi vidas la diferencon inter la pensmaniero de la Sinjoro kaj de Liaj disĉiploj?

*"La parakleto ... vin rememorigos pri ĉio, kion Mi diris al vi."* (Joh 14,26).

*Kontraŭuloj de Jesuo alkondukis virinon, kaptitan en adulto, en la templon dirante al Li: 'Majstro, ... en la leĝo de Moseo ordonis al ni tiajn ŝtonmortigi; sed kion vi diras?' ... Jesuo Sin klinis kaj per fingro skribis sur la tero. Kiam ili ankoraŭ demandis Lin, Li leviĝis, kaj diris al ili: 'Kiu el vi estas senpeka, tiu unua ĵetu sur ŝin ŝtonon. Kaj denove Li Sin klinis kaj skribis sur la tero. Sed aŭdinte tion ili eliris unu post la alia, komencante de la plej maljunaj kaj ĝis la lastaj; kaj restis Jesuo sola, kaj la virino staranta en la mezo. Kaj Jesuo leviĝis kaj diris al ŝi: 'Virino, kie ili estas? Ĉu neniu vin kondamnis?' Kaj ŝi diris: ‚Neniu, Sinjoro.' Jesuo diris al ŝi: ‚Ankaŭ Mi vin ne kondamnas; iru, kaj de nun ne plu peku.'* (Joh 8,1-11).

Denove signife diferenciĝas la tradicia pensmaniero de tiuj demandantoj kaj de la Sinjoro.

*La parakleto ... vin rememorigos pri ĉio, kion Mi diris al vi."* (Joh 14,26).

Kristanoj – ni – ofte forgesis tiajn ekzemplodonajn okazaĵojn: kiam niaj misiistoj ne estis akceptataj; kiam niaj respondeculoj toleris senliman uzon de ekonomia, politika kaj milita forto; kiam ni la justaĵon de povruloj ne metis sur la tagordon de la kristanaro. *"Mi elirigas la ŝtonan koron el via korpo,"* aŭdas Jeĥezkel diri la Sinjoron, la Eternulon, *"kaj Mi donos al vi koron karnan."* (36,26). *"Favorkora kaj kompatema estas la Eternulo, longtolerema kaj tre bona,"* laŭdas Psa. 103,8.

Ni facile forgesas, laŭ kia spirito disĉiploj de Jesuo Kristo estas, kion signifas aŭdi Lian vorton, sekvi Liajn postesignojn (1. Pet 2,21). Forlasu ni la malbonajn sinjorojn de hompereiga

1. Ho kiom triumfus la mastroj de l' mondo,
   se nur post la morto justeco alvenus,
   se ĉesus nur post la morto
   la forto de la fortuloj,
   se ĉesus nur post la morto
   la servo de la servuloj.

2. Ho kiom profitus la mastroj de l' mondo,
   se plue surtere nenio sin ŝanĝus,
   se daŭre restus stabila
   la povro de la povruloj,
   se daŭre restus stabila
   la povo de la povuloj.

3. Sed Kristo leviĝis. Li vokas al vivo:
   leviĝi, rezisti jam nun, sur ĉi tero,
   ribeli kontraŭ la mastroj,
   la mort-regado de l' mastroj.
   Li vokas vivi libere,
   nin vokas vivi libere.

DAS KÖNNTE DEN HERREN DER WELT JA SO PASSEN
M: W. Radeke 1990 germana T: Kurt Marti
E: Peter Bäß kaj Albrecht Kronenberger 2007

forto, de milito, sinjorojn de mono, sinjorojn misuzantajn sian aŭtoritaton kontraŭ povruloj, handikapuloj. Sekvu la ununuran Sinjoron, kiu venis por serĉi kaj savi la perditaĵon (Luk 19,10), kiu komencis Sian publikan faron rilatante al la profeta vorto: *"La spirito de la Eternulo estas sur mi, Ĉar Li min sanktoleis, por bonanonci al malriĉuloj; Li sendis min, por anonci liberecon al kaptitoj/ Kaj vidpovon al blinduloj,/ Por meti la vunditojn en liberecon,/ Por proklami favorjaron de la Eternulo"* [Jes. 61,1-2 ege signife forrompante la citaĵon antaŭ la mencio de "venĝotago de Dio"].

Karaj, ni kontemplis tri ekzemplodonajn okazintaĵojn montrantajn, kiel efikas la Sankta Spirito surtere inter homoj.

Li vokas nin per la Evangelio, Li faras ke ni kredu je la triunua Dio, ke ni aliru kaj sekvu ne alian ol Jesuon Kriston nian Sinjoron. La Sankta Spirito reprezentas nin antaŭ Dio kaj antaŭ la homaro. Li donas al ni forton unue iĝi kaj ĉiam denove iĝi, finfine resti disĉiploj de nia Sinjoro dum tempo de krizo, Li liberigas nin el dubo kaj malespero, Li preĝas anstataŭ ni mankante al ni vortoj, Li lumigas nin per Siaj donoj, ĉiutage Li favorkore pardonas al ni niajn pekojn, Li sanktigas nin kaj malebligas la pereon de Sia Eklezio.

Per vorto kaj sakramento Dio hodiaŭ nin denove rememorigas pri ĉio, kion nia krucumita, resurektita, ĉielen irinta, la Parakleto n sendanta Sinjoro diris al ni.

Benatan ĝojigan pentekoston!

*Kaj la paco de Dio, kiu superas ĉian intelekton, gardu viajn korojn kaj pensojn en Kristo Jesuo. Amen.*

-------------------------------------

Peter Bäß, pastoro em., Berlin
Prediko dum ekumena Diservo,
Preĝejo St. Josef/ Herzberg – la Esperanto-urbo, kun pastro Albrecht Kronenberger celebrata la 30-an de majo, je la 17-a horo.
Programero de 86-a GEK/ 8-a EEK.

[De sur la pulpitro mi ne menciis, kion mi legis antaŭ kelkaj monatoj en gazeto:

Manaĝeraro de nutraĵvendeja ĉeno malhelpis la sindikatan laboron ene de siaj vendejoj. Ne observinte la legitiman rajton de sia dungitaro ili minacis ilin per maldungo, se ili en sia laborejo agus kiel sindikatanoj. Vendistino Emmy tamen inter kolegoj agis kiel sindikatano, laŭ la validaj leĝoj. Pri tio ĉagrenis ŝia superulo. Iun vesperon, kiam la kaso de Emmy estis kontrolata, mankis kasa kupono pri € 1,30 botelgarantiaĵo en ŝia kaso. La superulo eksuspektis, ke Emmy ŝtelis tiun sumon el la kaso. Pro tiu suspekto Emmy estis maldungata, ĉar mankis nun plena konfido de la estraro al ŝi. Helpe de la sindikato ŝi ekprocesis kontraŭ la maldungo. La estraro sukcese defendiĝis, eĉ en superaj instancoj. Emmy apelacios al korto je homaj rajtoj en Strasburgo.

Ĉu egalrajtas Emmy kaj la manaĝeraro en ĉi tiu ekzemplo? Martin Niemöller estus demandinta: Kion Jesuo estus farinta?]

"Ne la sanuloj bezonas kuraciston, sed la malsanuloj" (Mar 2,17, Luk 5,31)

# Jesuo kuracas

Endre DUDICH, HU

El la kvar evangelioj ("bonaj novaĵoj") mi kompilis la rakontojn pri la okazoj, kiam Jesuo sanigis, purigis, eĉ revivigis homojn.

*"Jesuo trairis ĉiujn urbojn kaj vilaĝojn, instruante en iliaj sinagogoj, kaj predikante la bonan novaĵon de la regno [de Dio], kaj sanigante ĉian malsanon kaj ĉian malfortaĵon"* (Mat 9, 35-36) – Li diris al la senditoj de Johano la Baptisto: *"Iru kaj sciigu Johanon pri tio, kion vi vidis kaj aŭdis: blinduloj vidas, lamuloj marŝas, lepruloj estas purigitaj, surduloj aŭdas, mortintoj leviĝas, kaj al malriĉuloj bona novaĵo estas anoncita"* (Luk 7, 22-23)

## 1. Kion kaj kiom Jesuo kuracis?

*Evangelio de S. Mateo: 18 okazoj*

| | |
|---|---|
| 4, 23-24 | ĉian malsanon kaj malfortaĵon demonhavantojn, lunatikojn (epilepsulojn?) kaj paralizulojn |
| 8, 2-4 | paralizulon (filon de romia centestro, distance) |
| 8,14-15 | februlinon (la bopatrinon de Petro, per mantuŝo) |
| 8,12 | du demonhavantojn |
| 9,18-21 | knabinon mortan |
| 9,27-30 | du blindulojn, tuŝante iliajn okulojn |
| 9,32-34 | mutan demonhavanton |
| 11,4-5 | blindulojn, lamulojn, leprulojn, surdulojn, eĉ mortintojn |
| 12,22 | demonhavantan blindulon kaj mutulon |
| 14,36 | ...per tuŝo de lia mantelo |
| 15,22 | filinon de Kanaanino turmentatan de demono ("granda estas via fido", 15,28) |
| 15,30-34 | homojn lamajn, blindajn, mutajn, kriplajn |
| 17,18 | frenezan knabon demonhavantan |
| 20,30-34 | du blindulojn, tuŝante la okulojn |
| 21,14 | blindulojn kaj lamulojn en la templo |

*Evangelio de S. Marko: 11 okazoj*


| | |
|---|---|
| 1,23-26 | viron kun malbona spirito, per komando |
| 1,32-34 | malsanulojn kaj demonhavantojn |
| 1,40 | leprulon, tuŝante |
| 2,5-12 | paralizulon |
| 3,1-5 | velkintan manon, nur per komando |
| 5,2-15 | demonhavanton |
| 5,25-34 | virinon kiu havas sangofluon, tuŝantan la mantelon de Jesuo. "Eliris potenco" |
| 5,35-42 | mortintan filinon de la sinagogestro, per komando |

7,26-30 demonhavantan filinon de Grekino
8,22-26 blindulon, per ripetita mansurmeto
9,17-27 knabon kiu havis mutan spiriton, per preĝado
10,46-52 blindan almozulon: “via fido vin savis”

*Evangelio de S. Luko: 20 okazoj*

4,33-35 demonhavanton, “kun aŭtoritato kaj potenco”
4,38-39 la febrohavantan bopatrinon de Petro
4,40-41 diversajn malsanulojn,“li metis sur ĉiun el ili la manojn”
5,12-13 leprulon
5,18-25 paralizulon
6,6-10 velkintan dekstran manon, sabate

Jesuo kuracas demonhavantan viron.
Luko 4-36 [Doré]




6,18-19 ĉiujn; potenco eliris el li
7,2-10 sklavon de romia centestro “sed vorton parolu, kaj mia knabo saniĝos”, 7,7
7,11-15 mortintan junulon de Nain, tuŝante la portilon kaj komandante
7,21-22 ĉion
8,27-33 demonhavanton (pelante la demonon en gregon de porkoj)
8,40-55 mortintan filinon de la sinagogestro Jairus (prenante ŝian manon kaj komandante)
8,43-48 virinon kiu havas sangofluon; eliris potenco
9,11 tiujn kiuj bezonas kuracadon
9,38-42 knabon kiu havis malbonan spiriton
11,14 mutan demonulon
13,11-13 kunkurbitan virinon, metante sur ŝin la manojn
14,2 hidropsulon, sabate
17-11 dek leprulojn (nur unu revenis danki)
18,35-43 blindulon, “via fido vin savis”

*Evangelio de S. Johano: 4 okazoj*

4,46 filon de kortegano
5,2-9 malfortulon ĉe la lago Betesda en Jerusalemo
9,1-11 denaskan blindulon, metante koton sur la okulojn
11,1-44 Lazaron jam mortintan

Specoj kaj nombroj de kuracitoj (konsiderante la plurfoje rakontitajn kazojn kiel unu):

14 lepruloj, pli ol 10 blinduloj, 6 paralizuloj, 3 mutuloj, lamuloj, po 1-1 sangofluo, velkinta mano, februlo, surdulo,

kriplulo, hidropsulo, kunkurbitulino, lunatiko (epilepsulo), 9 demonhavantoj, 3 mortintoj.

Mateo pleje insistas pri la miraklaj kuracadoj.

Luko estas la plej akurata fake, ĉar laŭ la tradicio li mem estis kuracisto. En la Ago de la Apostoloj, li skribis jene pri kuracado farita de la apstoloj Petro kaj Johano: *"Li prenis la manon [de la denaska lamulo] kaj levis lin; kaj tuj liaj plandoj kaj maleolostoj fortiĝis, kaj li suprensalte stariĝis kaj piediris"* (Ago 3, 7-8)

Johano selektis nur kvar ekzemplojn, sed li tre detale – en tuta ĉapitro – rakontas unu el ili, nome la revivigon de Lazaro.

### 2. Kiel Jesuo kuracis?

Per korpa kontakto, mantuŝo, mansurmeto (Luk, 4,40; 13,13)

Eliris el li potenco (Mar 5,30; Luk 8,46)

Per preĝado kaj fastado (Mat 17,21)

Helpe de la kredo / fido de la kuracotulo (Mat 9,22; Mar 5,34; 12,52; 18,42)

La malfido malhelpas: en lia patrujo, la urbeto Nazareto *"pro ilia nekredemo li faris…ne multajn potencaĵojn."* (Mat 13,58; Mar 6,5; Luk 4,24)

Per parolata komando kun aŭ sen fizika signo, ankaŭ el konsiderinda distanco. Estas klare distingitaj la malsanuloj kaj la demonhavantoj. En la kazo de demonhavanto, Jesuo ne parolas al la homo, sed al la demono.

La efiko estas tuja kaj daŭra, en pluraj okazoj devige kontrolita de la kompetentaj pastroj.


La povo de kuracado estas transdonebla al la disĉiploj: Jesuo *"kunvokis al si la dek du disĉiplojn, kaj donis al ili aŭtoritaton super malpuraj spiritoj, por elpeli ilin, kaj por sanigi ĉian malsanon kaj ĉian malfortaĵon"* (Mat 10,1). *"Kaj jenaj signoj sekvos la kredantojn: en mia nomo ili elpelos demonojn; ili parolos per lingvoj;…sur malsanulojn ili metos la manojn, kaj ili saniĝos."* (Mar 16,17-18)

Tio inkluzivas ankaŭ la kuracadon de la animo, t.e. la pardonon de pekoj kaj krimoj: (Luk 5,24-25). Jesuo ankaŭ tiun potencon transdonis al siaj disĉiploj:

*"Ricevu la Sanktan Spiriton: kies pekojn vi pardonas, al tiuj ili estas pardonitaj; kies vi retenas, estas retenitaj."* Joh 20,22-23).

Pluraj sanigoj estas priskribitaj en la Agoj de la apostoloj: 3,6-8; 5,15-16; 8,7; 9,33-41; 14,8-10. Ankaŭ tiu libro estas atribuita al la evangelisto Luko.

Jesuo revivigas la filinon de Jairus
Luko 8,52-54 [Doré]



“Verŝajne ne bezonas pruvon, ke la kristanismo komence estis kuraca, terapia movado; se vi preferas, psikoterapia movado. Tamen, se oni volas paroli tre precize, oni devas diri, ke ĝi estas pneŭmoterapia movado. [pneŭma = spirito]. Jesuo Kristo kuracis per la potenco de la Spirito de Dio. (La vortoj kuracado kaj saniĝo estas nun uzataj plej larĝ-sence.)

Estas sufiĉe konate, ke ekzemple la farizeoj ankaŭ en la malsano serĉis la pekon, kaj mallaŭdis ĝin. Jesuo, male, traktis kaj kuracis ankaŭ la pekon kiel malsanon. Laŭ Jesuo, la nescio estas malsano; la malforteco estas malsano; la demonhavo estas malsano… Jesuo estis kuracisto, kaj lanĉis kuracan movadon.

Liaj malamikoj bonege sciis, ke Jesuo kuracas pneŭme, sed ili mallaŭdis kaj kalumniis lin, dirante, ke li kuracas per malpuraj spiritaj efikoj, laŭ la tiama formulado per la potenco de Belzebub [la estro de la “muŝoj”, t.e. de la demonoj aŭ diabloj, Mateo 12,24; Mar 3,22; Luk 11,15] Sed Jesuo diris plen-konscie: Mi elpelas la demonojn per la Spirito de Dio.” [Mat 12,28, 11,20]”

(Farkas, József: Pneumatoszféra. – A segítésre kész szellemi világ. Nyolc evangelizáció. – 80 oldal. Somhegyi Kiadó és Nyomda Kft, Velence, 2004 karácsony –
(la titolo esperantelingve:) Pneŭmatosfero. La helpopreta spirita mondo. Ok evangeliigoj. – 80 paĝoj – Eldonejo kaj presejo Somhegyi, Velence, Kristnasko 2004)

# Komuneco

Jacques TUINDER, NL

En ĉiu el ni kaŝiĝas profunda deziro komune vivi kun aliaj homoj. La individuo kaj la komunumo bezonas unu la alian en la ludo de dependeco kaj sendependeco. Kunhomoj ade provokas nin ludi ĉi tiun ludon.

Jen la idealoj kiuj 'forpelis' la junan teologio-studenton, Roger Schutz, el la sendanĝera Svislando. Regis milito, la eŭropaj 'kun'vivadoj plene ruiniĝis. En Laŭzano li kun kelkaj kunstudentoj jam estis fondinta etskalan, kristanan komunumon. Preĝi kaj labori, sur la genuoj, kaj fordoni sin al homoj helpon bezonantaj. Revi kaj agi. Batali kaj adori.

La batalo tre konkretiĝis: helpado al judaj homoj, por ke ili forlasu Francujon kaj trovu sekuran tegmenton en Svislando. Dum siaj vojaĝoj tra la suda parto de Francujo, kiu emis kaŝkunlabori kun Hitler, Roger alvenas en la malriĉa kaj izolita vilaĝeto Taize en Burgundio.

Maljuna virino demandas al li, ĉu li intencas ekokupi la domon kiu estas aĉetebla.

> Mi elektis Taize, ĉar la virino estis malriĉa. Kristo parolas per la buŝo de la povruloj, kaj estas bone aŭskulti ilin. La kontakto kun ili malhelpas la kredon fariĝi nebula kaj nereala.

La amikoj el Laŭzano aliĝis al Roger kaj li fariĝas ilia prioro. Ili tiam ne pensintus ke ilia malgranda komunumo diskreskos al unu el la plej grandaj kaj konataj 'monaĥejoj' nunaj. Kio tiradas la milojn da gejunuloj ĉiujare alfluantaj? Certe estas la komuneco, la solidareco, kiu tiel dolore mankas en nia socio nepersone malvarma kaj individue direktita. Taize estas printempo por la Eklezio, kaj junaj homoj estas kvazaŭ printempaj heroldoj por ĉi tiu laciĝinta instituto.

> Komuna vivo estas ebla nur tiam, kiam ĉiuj konsentas pri tio ke ni devas kune konstrui. Tiam ekaperas inter la homoj signo de unueco, kiu estas pli grava ol la plej nobla laboro individue farita, sen forta ligilo kun la komunumo.

En Taize grupo de naŭdek fratoj trifoje en la tago celebras la evangelian simplecon de la vivo. Ĉirkaŭas ĝin la gastamo kaj atentemo por la vizitantoj. La mantrecaj Taize-kantoj kvietigas ilian vivon kaj ofte konsolas la premitecon de la koro. Neniel pezas kredado kaj konfesado, ĉar kie regas amo kaj kompato, tie loĝas Dio.

Kiam pilgrimantoj antaŭ kelke da jaroj restadis en Taize, ilin frapis tiu etstatura, fragila, karisma viro, frato Roger, fondinto kaj prioro. Li instruis al ĉiu preterpasi teologion kaj serĉi komunecon kun Kristo. Ĉu homoj Lin konas aŭ ne konas, Kristo, la Releviĝinto, restas ĉe ĉiu el ni kiel kaŝpasaĝero, eĉ tiam kiam ni mem ne scias.

En la somero de la jaro 2005, meze de siaj fratoj kaj miloj da gejunuloj, mensmalsana virino per tranĉilo mortigis la 90-jaran fraton Roger. Profunda ŝoko trafis la mondon. Kiel povas okazi, ke iu celis elmondigi tian viron de komuneco kaj repaciĝo? Estiĝas furiozo, senespero, nekredo. Ĉu do neniam finiĝas ĉiuloka kaj senfina elverŝado de sango? Homo, vidu kion povas fari kunhomo psike malsana! Kaj kara Dio, kial Vi ĉi tie entreprenis nenion?

Frato Roger Schutz foriris, kiel li iam venis en Taize, en simpleco kaj komuneco. Kiam liaj fratoj adiaŭis lin, ili preĝis:

> Vi, Kristo, plena de kompato, Vi igas nin esti en komuneco kun tiuj, kiuj antaŭiris nin kaj povas resti al ni tre apudaj. Ni remetas nian fraton Roger en viajn manojn. Jam li komencis vidi kion ni ankoraŭ ne vidas. Ni deziras sekvi lin kaj petas Vin, ke vi tiel preparu nin ke ni ricevu radion de Via lumo! ☙

Frato Roger Schutz [foto el Vikipedio]



# Nenian malbonon faru al vi!

József FARKAS†
El la hungara tradukis Éva FARKAS-TATÁR

...tiel kriis la apostolo Paŭlo al la malliberejestro, kiu en kriza situacio de sia vivo tiel sentis, ke ĉio finiĝis, la sola solvo estas la memmortigo (Agoj 16,28). Ni komprenu la vortojn de Paŭlo nun, kiel Vortojn de Dio – eĉ en ĉi tiu mallonga skribaĵo.

Surprize multmaniere ni povas fari malbonon al ni mem – noci nin. Ni povus detale paroli pri tio, kiom multe ni nocas la mirinde bele kreitan mondon de Dio (globala medio-poluado) kaj kiom da malbono ni faras al aliuloj.

> 27 Kaj la malliberejestro, vekiĝinte, kaj vidante la pordojn de la karcero malfermitaj, eltiris sian glavon kaj volis mortigi sin, supozante, ke la malliberuloj forkuris. 28 Sed Paŭlo vokis per laŭta voĉo, dirante: Nenian malbonon faru al *vi,* ĉar ni ĉiuj estas ĉi tie. 29 Kaj veniginte lumilon, li ensaltis, kaj, tremante de timo, kliniĝis antaŭ Paŭlo kaj Silas,...

Ni "nocas" ankaŭ nian homan medion per nia senpacienco, perforteco, esence senameco. Estas facile kompreni, ke en iun ajn direkton kaj iu ajn maniere ni nocas ion aŭ iujn, ĉio ĉiam rebatas nin mem kaj tiel ni ĉiam "faras malbonon" ankaŭ al ni mem.

Nun ni rigardu aparte tiujn kazojn en kiuj ni senpere "faras malbonon al ni". Ni povas "pagane" kaj "kristane" noci nin. (Kaj nature ni povas parigi la du, tiel la nocado estas eĉ pli efika.)

Pagane ni nocas nin kiam ni vivas senbride kaj tiel ni rapidigas la malsaniĝon, maljuniĝon, la fruan morton de nia korpo-animo. Konataj estas la paganaj nocadoj, cigaredo, alkoholo, manĝegado, tablojdoj amase, noktumado, malmulte da moviĝo ... Pli komplika estas la situacio tiam, kiam en la kaŝejoj de la animo okazas la nocado. Ofta ekzemplo estas tiam ke streĉiteco estas en ni kontraŭ nia ĉefo, patro, patrino, amanto, edzino kiu estas pli forta, do ni ne povas tien bati kaj la animo returnas la kumuliĝintan koleron, ekscitiĝon al si mem kaj difektas, konsumas siajn proprajn fortojn. La vorto de Dio estas: *ne faru malbonon al vi*!

Ankaŭ "kristane" validas ĉi tiu admono. Ni pensas pri tiuj fervoregaj kredantoj, kiuj ofte tiel servas, tiel "lumas" kiel kandelo bruligita ambaŭflanke. Kvankam sufiĉas se la kandelo en la kandelingo starante lumas ĉirkaŭe.

Estimplene ni pensas pri tiuj, kiuj kiel kometoj kuregante forbruligas sian vivon. Sed nia ekzemplo, "modelo" ankaŭ en ĉi tio estas Jesuo Kristo. Kvankam, miloj da homoj, malsanuloj svarmis al li, nenio ŝanceligis lin el sia dia ritmo. Li vivis en la harmonio de silento kaj agado, pleniĝado kaj disdonado. Li povis retiriĝi kaj iom ripozi.

Obeeme li dediĉis sin al la sufero de krucumiĝo, sed ĝis kiam ne venis ties horo – "li ne faris malbonon al si". ☙

# 40-jara KELI-sekcio en Ĉeĥio

Pavel POLNICKÝ, CZ

Ĉi-jare festas sian 40-an jubileon ne nur Ĉeĥa Esperanto-Asocio, sed ankaŭ ĝia Sekcio de kristanaj esperantistoj, kiu estas landa sekcio de KELI. Dum la Konstitucia kongreso de ĈEA (29.–30.3.1969) en Brno estis fonditaj ankaŭ sekcioj katolika kaj kristana.

Protestantaj kristanoj – esperantistoj unue renkontiĝis en nia lando jam dum la UK en Praha (1921). Tiam dr. ing. P. Hübner informis proksimume 20 partoprenantojn pri KELI kaj la gazeto Dia Regno. Antaŭ la 2-a mondmilito vizitis nian landon Anna Alamo-Sandgren kiu ankaŭ informis pri aktivado de KELI tutmonda… Ĉeĥaj protestantaj esperantistoj komencis aktivi jam en la jaro 1965, kiam estis fondita en Praha porpaca rondeto de pastraro sub la gvido de d-ro Rudolf Horský. Kelkaj ĉeĥaj esperantistoj ricevadis gazeton Dia Regno dank' al Adopta kaso de KELI kaj nur unuopuloj povis partopreni KELI kongresojn… (mia unua estis en Torre Pellice 1967).

Vendrede la 28-an de marto 1969 (naskiĝtago de Jan Amos Komenský) renkontiĝis en Hus-ana paroĥejo de Ĉeĥoslovaka eklezio en Brno 25 anoj el diversaj lokoj kaj fondis sekcion, kiu estis dum la kongreso oficiale aprobita.




## NOVA LANDA SEKCIO

La 28-an de marto 1969 fondiĝis la ĉeĥa sekcio de KELI dum kongreso en Brno. La sekcio estas ankaŭ sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Post Diservo en Esperanto fare de d-ro Rudolf Horsky kaj ties trarigardo de la ĝis tiam farita laboro, ĉiuj el la 25 partoprenantoj aprobis la proponitan statuton, verkitan de prepara komitato.

Sur la foto (dekstre) oni vidas la buston de Comenius, en kies naskiĝtago okazis la kongreso, kaj la membrojn de la elektita komitato. De maldekstre, sidante: Ladislav Kynčl, revizoro; Jaroslav Adamec, sekretario; Antonin Jandik, membro por la gazetaraj aferoj; d-ro Rudolf Horsky, prezidanto; starante: Odehnal, revizoro; ing. Pavel Tichy, membro por la junularo; Dobromil Maly, vic-komitatano; Ladislav Kopecky, por ekumena kontakto kun IKUE.

La vortoj sur la muro signifas: „En paco kaj trankvilo ni prezentu niajn korojn al Dio kiel sanktan oferajon".

Ceteraj komitatanoj estas: Cyril Horák, vic-prezidanto; Zirovnicka, kasistino; Jitka Kopová, distribuanto de Dia Regno. Oni aprobis kotizon de Kčs 30,— jare, inklude de Dia Regno. Landa informilo oni kunsendos kun Dia Regno. Redaktoro de ĉi tiu bulteno estas Antonín Jandik.

Komuna kunsido de IKUE kaj KELI, la 30-an de marto 1969 decidis pri kunlaboro. La komitato kiu preparos la kongresoj en Ĉeĥoslovakio konsistas el inĝ. P. Tichy, L. Kopecky kaj J. Adamec.

Benjamin Vêk kaj Jaromir Hoffner fariĝis honoraj membroj.

(vidu foton kaj tekston el DR 5/69).

Jam dum la kongreso estis pritraktita ebleco organizi kun katolika sekcio venontjare ekumenan kongreson en nia lando. Preparlaboroj daŭris kaj kiel kongresloko estis elektita Brno kaj kongreso estis finfine eĉ „permesita“ de politikaj kaj ŝtataj instancoj. Invitiloj kaj aliĝiloj disflugis al tuta mondo, bunta programo estis preparita, ĉeĥaj membroj ĝojis, ke finfine ili kongresos en nia lando. Okazis unua jarkunveno de nia sekcio… (vidu bildon el DR5/70)

Amase venas novaj kaj novaj aliĝiloj (laŭ 3-a listo jam 290 kongresanoj!!) kaj neniu povis imagi, ke Ministerio de internaj aferoj MALPERMESOS kongreson!!! Granda ŝoko kaj perdo de iluzioj pri nia tiama politika sistemo!! (Kaj precipe multaj zorgoj por trovi novan kongreslokon – Klagenfurt). Al la situacio tuj reagis komitato de ĈEA kaj jam 4.7.70 decidis, ke statutoj de la sekcioj devas esti denove pritraktitaj!! kaj ĉiuj aranĝoj de sekcioj devas antaŭe esti aprobitaj de la asocia estraro!! Kvankam ni akceptis tion, ni ne povis labori tre longe – en la jaro 1974 decidis komitato de ĈEA, ke sekcioj katolika kaj kristana ekzistu nur en la kadro de sekcio MEM (Mondpaca e-a movado) – kaj tio tre bremsis laboron.

Nur post ŝanĝo de politika sistemo – 5.3.1990 nia sekcio refondiĝis kaj de la jaro 1991 havas eĉ juran memstarecon en la kadro de ĈEA. Tio al ni ebligis eĉ pensi pri organizado de iu KELI kongreso. Kaj tio realiĝis en pli postaj jaroj – 2000 Janské lázně, 2004 Bystřice pod Hostýnem, 2006 Strážné, 2008 – Pribylina (Slovakio). De la jaro 2005 estas KELI gazeto Dia Regno presata kaj dissendata el Ĉeĥio

apera monate — DIA REGNO — 1970 n-ro 5 majo



## Jarkunveno de la plej juna KELI-sekcio

La 7-an de marto okazis la unua jarkunveno de la KELI-anoj en Ĉeĥoslovakio. Ĉeestis 23 personoj en Farsky-salono de Hus-preĝejo, Praha. En la komenco de la kunveno predikis pastoro Cyril Horák pri Hoŝea 12 : 6. La prezidanto d-ro Rudolf Horsky raportis pri la unua jaro de „Sekcio de Kristanaj Esperantistoj”.

Estus tede remaĉi ĉion pri kio parolas la protokolo, kaj kion Dia Regno en la daŭro de la pasinta jaro informis pro la fidela raportado de niaj tieaj membroj.

Tamen mi ne volas deteni al vi informon ke la Esperanto-flago de KELI, kiu flirtis en Kiljava, jam troviĝas en Botanická-strato, Brno.

**Antaŭkongreso**

Cetere estas ankoraŭ grava komuniko. Antaŭ nia kongreso en Brno okazos antaŭkongreso en Praha, la 22-an kaj 23-an de julio. Prizorgos ĝin la KELI-grupo en Praha.

Oni vizitos la historiajn kaj artoplenajn belaĵojn de la „ora” Praha, kun esperantista gvidado.

Por tiu antaŭkongreso oni povas anonci sin ĉe s-ino D. Vybíralová, Leningradská 37, Praha-Vršovice, Ĉeĥoslovakio.

*Republikigo el Dia Regno 1967*


DIA REGNO

OFICIALA ORGANO DE KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA

# "Nia laboro ne estas vana en la Sinjoro"

## Laborplano de KELI (V)

Adolf BURKHARDT†, DE

### 5) Informadi pri Esperanto kaj speciale pri K.E.L.I en la nacilingva gazetaro.

*a) Doni informojn al la redakcio de la lokaj gazetoj kaj kristanaj revuoj.*

En pluraj landoj aperas nacilingvaj bultenoj pri Esperanto; pluraj sekciaj bultenoj de K.E.L.I. enhavas nacilingvajn erojn, kiuj direktiĝas al la publiko. Estas utile kolekti tiajn bultenojn, sed estas pli utile sendi ilin al redakcio. La gazetoj ne povas raporti pri nia laboro, se ni prisilentas ĝin. Ĉiupaŝe oni konstatas, kiel malmulte oni ĝenerale scias pri ni. Necesas daŭra persista liverado de informoj. Ili ne ŝimu en niaj propraj tirkestoj. Neniu pensu, ke la Estraro povos fari tiun laboron. Transdoni pretajn informojn povas ĉiu membro.

Gratulon kaj dankon al ĉiuj kiuj jam agis kaj agas.

*b) Verki aŭ traduki raportojn kaj artikolojn.*

Raportojn la redakcioj pleje emas akcepti, se temas pri freŝa aktualaĵo kun loka koloro. Partopreno en kongreso aŭ vizito de interesa gasto ofte donas okazon rememorigi pri nia lingvo. Estas grave eviti troigojn kaj senbazajn asertojn (ekzemple pri "multaj milionoj da esperantistoj" – se ili ekzistas, kial ili ne subskribis la UN-proponon?)

Pri kongreso ni povas atentigi antaŭe, kaj doni raporton poste. Kio estas tradukenda kaj tradukinda? Tio dependas de la speco de la revuo, al kiu vi proponos vian tradukon.- Tial ni ne povas aparte signi taŭgajn materialojn en Dia Regno. Ĉiu devas mem esplori. Ni

havas kuraĝigajn ekzemplojn de aktivaj membroj, kiuj meritas ĉies imiton. (vidu ankaŭ sub punkto e) de ĉi tiu ero)

*c) Reagi al koncernaj artikoloj aŭ mencioj en la gazetaro.*

Redakcio, same kiel industria entrepreno, atente observas la "merkaton". Grava indiko pri la intereso de iu temo estas la nombro da leteroj de legantoj. Kiam vi legas misprezenton de Esperanto ie ajn, sendu korekton, aŭ donu – tuj – la konvenan artikolon al persono, kiu kapablas lerte respondi (modele organizis tiun taskon Brita Esperanto Asocio). Sed ne nur kiam io ne plaĉas, ni devas reagi. Pro objektiva kaj bona raporto, la redakcio ricevu dankon. Pli grava ol bildkarto al korespondamiko (–li kompreneme atendos plian semajnon) estas tuja danko – sufiĉas kelkaj linioj, sen superfluaj formalaĵoj – al tia redakcio. Mi demandas vin: Ĉu efektive vi ne povus pli energie kunlabori ĝuste en tiu rilato?

*d) Mencii adreson por pli da informoj.*

Nia tuta informa laboro restas senfrukta, se vera interesiĝanto ne ricevas eblecon starigi kontakton kun ni. Tial, se iel eble, ni almenaŭ de tempo al tempo enŝovu koncizan tamen sufiĉan adreson, kie oni povas akiri pli da detaloj. Ne ĉiam redakcio akceptos tion, sed denove ni provu. Ekzemple: "La spaco ĉi tie ne permesas detale prezenti la lingvon mem. Informojn pri tio donas..."

*e) Kolekti ĉion pri Esperanto kaj KELI por ĉiu-jara dumkongresa ekspozicio.*

La sukceso de unu estas instigo por la alia. Tio kondukis al la ideo pri Ekspozicio "La nacilingvaj gazetoj raportas pri ni". Dum la K.E.L.I-kongresoj ni elmontras, kio aperis dum la pasinta periodo. Ĉefe kontribuis ĝis nun kelkaj membroj per eltranĉaĵoj en angla, germana, nederlanda kaj sveda lingvoj. Sed ne mankas eĉ korea. Lastatempe pola, ĉeĥa kaj hungara lingvoj amplekse estis reprezentitaj. En la franca aperis i.a. tre detala artikolo.

Tiu nekompleta mencio de ekzemploj instigu denove, ke ĉiu kiu trovas ion (do ne nur la aŭtoroj mem), sendu la eltranĉaĵojn kun la titolparto de la gazeto (nomo, dato, loko) al la [redakcio]...

## Informoj el Ĉinio:

Venis gajigaj informoj de niaj ĉinaj fratoj HSU Chungmu kaj MU Binghua. Mu Binghua raportas mallonge pri sia malfacila situacio post la tertremo en lia provinco 2008. Lia loĝdomo detruiĝis kaj nur lastatempe li sukcesis akiri novan loĝlokon por sia familio. Li denove kontribuas per rakonteto al Dia Regno sed mi nur sekvontnumere publikigos ĝin. En la letero Mu Binghua dankas pro la apogo, kiun li ricevis de KELI kaj kelkaj membroj.

Hsu Chungmu raportas ke pro la publikigo en Dia Regno pri lia grupo kiu studas esperanton, oni publikigis artikolon en ĉina ĵurnalo. Tio montras, laŭ Hsu Chungmu, pli grandan malfermecon flanke de la aŭtoritatoj. Li sendis novan foton pri sia grupo kune kun la artikolo aperinta en ĉina gazeto. (vidu la frontan paĝon)

# Sekretaria jarraporto pri la jaro 2008 kaj ...

Raportas Pavel POLNICKÝ, CZ

Certe nekutima titolo por mia jarraporto, sed mi tuj klarigos ĝin al Vi. Mi kompreneble scias, ke por bone aprezi laboron de ĉiu organizaĵo estas necese havi plej eble detalan raporton. Sed plej ofte okazas jarkunvenoj komence de la jaro kaj tiam estas normala taksi kalendaran jaron. Nia ligo organizas jarkunvenon dum ĉiujara somera kongreso kaj ŝajnas al mi, ke pli bone estos informi pri agado de post la lasta jarkunveno….

Kiel sekretario mi havas kontakton kun unuopaj funkciuloj aŭ aktivaj anoj de niaj sekcioj en diversaj landoj, sed nur escepte mi ricevas informojn pri ilia laboro. Ofte mi respondas diversajn retmesaĝojn kun la peto pri helpo materia aŭ financa, precipe el Afriko, kiujn ni post la konsulto kun estraranoj plenumas laŭ niaj eblecoj. Nove mi kiel sekretario vojaĝis ankaŭ eksterlanden. En Bulgario ni kun M. Šváček kaj pastro B. Eichkorn konsultis eblecon organizi tie estontece iun kongreson. En Vroclavo ni kun M. Šváček pritraktis staton de la preparoj de ekumena kongreso. Dum mia privata vizito de Germanio mi du tagojn gastis en la familio de nia kasisto S. Krüger (ni havis eblecon paroli pri financa stato de nia ligo) kaj laste vizitis min pastro B. Eichkorn dum sia restado en Ĉeĥio. Kelkajn horojn ni pridiskutis nian estontan kunlaboron pere de nova ekumena komisiono. Tion ni nepre devas pritrakti dum komuna kongreso en Vroclavo. En mia domo restas ankoraŭ proks. 150 ekz. de la libreto *Preĝo por ĉiu tago* kiun mi dissendas, sed laste nur escepte venas mendoj…..uzu tiun broŝureton kiel taŭgan donacon…..

Kelkaj vortoj pri landaj aktivadoj:

**Britio** – laŭ informoj de J. Bisset kaj FBCE-letero okazis diservo dum maja brita kongreso en Salisbury, plia diservo estas preparata por junia skota kongreso kaj tria okazos aŭtune dum kutima Studrondo. Geedzoj Bisset aliĝis al la ekumena kongreso, do post certa tempo denove estos britoj inter niaj kongresanoj.

**Finnlando** – sub la gvido de O. Kantele okazis dum aŭtunaj tagoj kunveno de finna sekcio kun matena preĝo. 17 membroj ricevas kvarfoje jare cirkuleron. Ni dankas pro financaj donacoj – al Evidente 165 €; al Adopta kaso 75 €.

**Germanio** – prezidanto de KELI sekcio pastoro W. Rohloff planis junian seminarion en Zöblitz, sed, ĉar aliĝis nur kelkaj personoj, la seminario estis nuligita.

**Ĉeĥio** – dum somera KELI kongreso estis konfirmita sekcia estraro. Por 18 membroj estas eldonata neregula Informilo kun necesaj novaĵoj. Daŭre estas en Poděbrady presata kaj dissendata la gazeto Dia Regno.

**Rusio** – laŭ informo de Larisa Kuz-

menko 15 kristanoj estas precipe en koresponda kontakto kaj nur kelkaj partoprenis tradician renkonton en Jekaterinburgo kaj decembre en la sama loko Tagon de L.L.Zamenhof. Kristanoj aktive helpas per vestaĵoj kaj nutraĵoj al malriĉuloj… Larisa finas sian jarraporton jene:

> "*Ni dankas estraron de KELI por la revuo DIA REGNO, kie ni trovas utilan informon. Helpe de la revuo ni sentas nian realan apartenon al la Esperanta Kristana Mondo*".

**Madagaskaro –** fine de aŭgusto mi ricevis informon, ke estis fondita AME (Asocio de Malagasaj Evangeliistoj), sed pliajn informojn kaj promesitan statuton mi ĝis nun ne ricevis.

**Burundio** – jam aŭtune mi sendis necesajn informojn por fondi sekcion, sed ankaŭ de tiu lando venis nenio nova….

Kontaktojn ni havas ankaŭ kun kelkaj aliaj landoj de Afriko…

Multaj aranĝoj mankas en mia raporto, sed nur pro tio, ke neniu informis min…do, mi atendas novaĵojn de Vi.

# Tagordo por la jarkunveno de KELI 2009

1 Malfermo
2 Elekto de kunprotokolantoj
3 Akcepto de la tagordo
4 Komunikoj
5 Funebra memorigo
6 Sekretaria jarraporto
7 Kasista jarraporto
8 Raporto de la kaskontrolantoj
9 Buĝetoj
10 Raporto de la redaktoro
11 Estrarelekto
12 Kongresplanoj
13 Ideoj kaj sugestoj de la membroj
14 Fermo

**Klarigoj:**

(11) *Ĉi-jare finiĝas la deĵorperiodo de la redaktoro Bengt Olof Åradsson kaj de la estraranoj Iren Bagi kaj Zoltán Somhegyi*

(12) *Proponita loko por la kongreso 2010: Hungario*

## Financa raporto de KELI 2008 (Ĉiuj sumoj en EŬR)

| | | Bilancoj fine de la jaroj 2007 | 2008 |
|---|---|---|---|
| **Aktivoj** | PB-Ĝiro (PB = Postbank NL) | 2.937,93 | 1.303,90 |
| | PB-Rentemeerrekening (2,7%) | 32.390,64 | 33.266,12 |
| | UEA-konto kelk-p | 1.954,42 | 711,95 |
| | Kasista kaso | 59,86 | 9,16 |
| | Pavel Polnický, CZ | 0,00 | 1.112,00 |
| | *Monrimedoj* | *37.342,85* | *36.403,13* |
| | Postulo UK-salono por KELI/IKUE | 80,00 | 0.00 |
| | Postulo el librovendado (Biblio) | 509,30 | 401.47 |
| | *Postuloj* | *589,30* | *401,47* |
| | Stokoj (libroj) | 6.455,55 | 5.829,50 |
| | E-Misio, Kasedoj D.K. | 211,70 | 116,00 |
| | *Provizo* | *7.256,55* | *5945,50* |
| | Transitaĵoj | 0,00 | 0,00 |
| | **Aktivoj sume** | **44.599,40** | **42.750,10** |
| **Pasivoj** | Kapitalo | 8.110,12 | 8.521,14 |
| | Saldoj negativa/pozitiva | **753,02** | **651,20** |
| | *Kapitalo entute* | *8.863,14* | *9.172,34* |
| | Dumvivaj membroj | 2.444,27 | 2.382,43 |
| | E-Misio | 7.988,22 | 6.802,91 |
| | Helpa kaso | 2.814,97 | 2.559,97 |
| | Junulara helpa kaso | 337,45 | 337,45 |
| | Kongresa rezerva kaso | 1.472,18 | 1.761,48 |
| | Literatura/Himnara kaso | 13.058,57 | 13.058,57 |
| | Informada/Varbada kaso | 214,72 | 149,72 |
| | Legaco C.P.W. | 2.268,90 | 2.268,90 |
| | Legaco E.t.O.-W. | 2.268,90 | 2.268,90 |
| | Legaco Boven | 1.865,00 | 1.865,00 |
| | *Fondusoj entute* | *34.743,18* | *33.455,33* |
| | Pasivo | 0,00 | 0,00 |
| | Kreditoroj | 450,58 | 95,25 |
| | Transitaĵoj | 542,50 | 27,18 |
| | *Pasivoj* | *993,08* | *122,43* |
| | **Pasivoj sume** | **44.599,40** | **42.750,10** |

## Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2008-12-31

### Aktivoj

Pavel Polnicky, CZ Li gvidas kason por pagi la presadon kaj sendadon de DR el CZ

Stokoj: Biblio (63), Biblio 2006 (655), Novaj Testamentoj broŝ. (30), Novaj Testamentoj bind. (36), Evangelioj laŭ Johano (33), Adoru Kantante (9), Esperante kaj Ekumene (2), Adoru (15). La libroj estas parte stokataj ĉe Els van Dijk(NL) kaj Jacques Tuinder(NL), Bengt Olof Aradsson(SE),Siegfried Krüger(DE), Eva Farkas(HU), Kazimierz Leja(PL), Karl Heinz Schaeffer(D). La plej grandan parton de la Biblioj stokas por ni Bernhard Eichkorn (D)

E-Miisio kasedoj: Dimanĉa koncerto (40) La vendontoj estas petataj kontakti la kasiston.

Postulo el librovendado: Bernhard Eichkorn (IKUE) kaj KELI financis 2006 la noveldonon de la Biblio. Kvanto 4000 ekzempleroj, 1000 financis KELI (1000 x 7,63 = 7630 EŬR). Je la fino de la jaro estis venditaj 190 ekzempleroj. Laŭ interkonsento Bernhard Eichkorn stokas la bibliojn kaj la profito estas dividita 3:1. El tio rezultas la postulo de 509,30 EŬR, kiu jam estas pagita.

Unuan fojon post jaroj ni inventuris la stokon kaj la kasedojn. Ni devis deskribi 491,91 EŬR kaj prenis tiun monon el la E-Misia Kaso, ĉar multaj aĵoj estis senkoste disdonitaj. Tute ne tuŝita de tio estis la stoko Biblio 2006

Postulo el librovendado: Bernhard Eichkorn (IKUE) kaj KELI financis 2006 la noveldonon de la Biblio. Kvanto 4000 ekz, 1000 financis KELI (1000 x 7,63 = 7630 EŬR). 2008 estis venditaj 113 ekz. Laŭ interkonsento la profito estas dividita 3:1. El tio rezultas la postulo de 401,47 EŬR.

### Pasivoj

Kapitalo: Estas la libera kapitalo, alian vidu sub Fondusoj

Saldo pozitiva: 651,20 EŬR

Fondusoj: Helpa kaso: Estas por helpo al nepagipovaj membroj partopreni kongreson. Ni subtenis kelkajn personojn.
E-Miisio: En 2008 KELI noveldonis la preĝlibreton de Jelly Kooopmans "Preĝo por ĉiu Tago" favore al Evidente. Pro tio kaj pro la deskribo de la stokoj la kapitalo malgrandiĝis je 1195,31 EUR. KELI-membroj donacis pere de la kasisto 2008 al Evidente 1100.46 EŬR

Kreditoroj: Hungara kaso nuligita en 2008; Brita kaso 95,25 EŬR (Jean Bisset)

Transitaĵoj: Kasistaj elspezoj 2008: 27,18 EŬR

*La bilanca sumo malgrandiĝis je 1849 EŬR pro*

- Deskribo de la stoko kun 492 EŬR post inventuro
- Noveldono de la libreto "Preĝo por ĉiu Tago" favore al Evidente kun 800 EUR
- Donaco pro tertremo en Ĉinio kun 200 EŬR
- Komputilo (50%) por la sekretario kun 142 EŬR
- Donacoj el Helpa Kaso por KELI-anoj kun 215 EŬR

Ĉi tiuj sumoj estis kontigitaj el la kapitalo kaj ne aperas en la rezulto (gajno kaj perdo).

## Rezulto 2008 kaj buĝetoj 2008, 2009 kaj 2010 (Ĉiuj sumoj en EUR)

| | Buĝeto 2008 | Rezulto 2008 | Buĝeto 2009 | Buĝeto 2010 |
|---|---|---|---|---|
| **Elspezoj** | | | | |
| Presisto kaj sendado de DR | 2.950 | 3.088,50 | 3.000 | 3.100 |
| Perantoj | 20 | 0,00 | 20 | 20 |
| *Revukostoj* | *2.970* | *3.088,50* | *3.020* | *3.120* |
| Prezidanto | 30 | 0,00 | 30 | 30 |
| Sekretario | 80 | 120,00 | 80 | 80 |
| Redaktoro | 250 | 250,00 | 250 | 250 |
| Kasisto/Matrikulisto | 50 | 27,18 | 40 | 40 |
| *Estrarkostoj* | *410* | *397,18* | *400* | *400* |
| UEA-kotizo | 60 | 58,00 | 60 | 60 |
| Ĉambro de Komerco | 30 | 43,80 | 30 | 30 |
| Kaskontrolo | 40 | 104,13 | 60 | 60 |
| Bankkostoj | 45 | 40,00 | 80 | 80 |
| Merituloj | 25 | 0,00 | 30 | 30 |
| UK Lukostoj | 80 | 250,00 | (70) | 70 |
| *Ĝeneralaj kostoj* | *280* | *522,93* | *260* | *330* |
| Librovendado (kostoj) | 300 | 226,84 | 250 | 230 |
| Varbado (Inf./varba kaso) | 30 | 20,00 | 20 | 20 |
| Rabatoj de Perantoj | 20 | 21,60 | 20 | 20 |
| *Aliaj elspezoj* | 350 | *268,44* | *290* | *270* |
| **Elspezoj entute** | **4.010** | **3.187,85** | **3.160** | **3.065** |
| **Enspezoj** | | | | |
| Kotizoj/Abonoj | 2.700 | 2.660,39 | 2.700 | 2.650 |
| Kotiz- kaj kursdiferencoj | 15 | -218,18 | 10 | 15 |
| Adopta Kaso | 450 | 745,64 | 450 | 400 |
| *Kotizoj entute* | *3.165* | *3.187,85* | *3.160* | *3.065* |
| Librovendado | 500 | 421,47 | 400 | 380 |
| Rentumoj | 700 | 811,93 | 800 | 800 |
| Profito el kongreso | 0 | 507,00 | 0 | 0 |
| *Aliaj enspezoj* | *1.200* | *1.740,40* | *1.200* | *1.180* |
| **Enspezoj entute** | **4.365** | **4.928,25** | **4.360** | **4.265** |
| **Saldoj** | **355** | **651,20** | **360** | **145** |

## Klarigoj pri la rezulto 2008 kaj la buĝetoj 2009/2010

Kotizoj pagendaj de

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Membroj individuaj | 143 | (147) | Nuraj abonantoj ... | 23 (24) |
| Membroj familianaj .. | 8 | (10) | IKUE-abonantoj ... | 26 (23) |
| Membroj subtenantaj ... | 4 | (3) | | 49 (47) |
| Membroj dumvivaj | 19 | (19) | | |
| Membroj adoptitaj | 131 | (129) | | |
| | 305 | (308) | (antaŭa jaro inter krampoj) | |

La membraro minimume reduktiĝis, La abonantaro minimume kreskis.

**Librovendado:** La kostoj aŭ enspezoj por librovendado influas la saldon.

**Adopta Kaso:** Mono donacita de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Estas membroj en Albanio, Afriko, Bulgario, Ĉeĥa Respubliko, Ĉinio, Estonio, Hungario, Litovio, Pollando, Rumanio, Rusio. Ili estas petataj kontribui "laŭforte" (kotizo laŭ interkonsento kun la landa peranto). Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj. En 2008 enfluis 745,64 EŬR

**Kotizoj** hungaraj 177,33, ĉeĥaj 120, rumanaj 100 EŬR

**Donacoj** finna 75, hungara 80, brita 75, sveda 10 EŬR. Unuopaj membroj entute 108,31 EŬR

Saldoj 2008, 2009 kaj 2010: La financa bazo de KELI estas ankoraŭ kontentiga.

Heilbronn, 2009-05-09

**Siegfried KRÜGER**, kasisto

Bildoj el la kasista laboro – inventuro ĉe B. Eichkorn kaj diskuto kun la sekretario







# Inventuro de la noveldonita Biblio en Esperanto

## Protokolo

de la tria jarfina inventuro de la Biblioj en la domo de pastro Bernhard Eichkorn en VS-Villingen, Romäusring 20

Dato: 15.01.2009
Partoprenintoj: Bernhard Eichkorn, Karl Heinz Schaeffer, Siegfried Krüger

La ankoraŭ ne venditaj Biblioj je 31.12.2008 estas stokitaj ĉe:

| | KELI | IKUE | Sumo |
|---|---|---|---|
| Bernhard Eichkorn | | 2426 | 2426 |
| Alois Eder | | 7 | 7 |
| Els van Dijk, NL | 7 | | 7 |
| Siegfried Krüger | 11 | | 11 |
| Karl Heinz Schaeffer | 106 | | 106 |
| | | | 2557 *) |

*) De la 2557 restantaj Biblioj estas pagitaj de KELI 639, de IKUE 1918.

Venditaj Biblioj en 2008: 138
Enspezoj reduktitaj per elspezoj:
Laŭ interkonsento la mono estu dividitaj proporcie 3:1

| | | |
|---|---|---|
| KELI | 401,47 | |
| IKUE | 1204,43 | |
| | 1605,90 | EŬR |

Bernhard Eichkorn ĝiros la enspezparton por KELI al la UEA-konto kelk-p de KELI.

Danko estu denove al Bernhard Eichkorn pro la bona prizorgado de ĉiuj aferoj rilate al la stokitaj Biblioj.

Bernhard Eichkorn
Siegfried Krüger
Karl Heinz Schaeffer



# Informetoj

Karaj, mi petas vin, ke vi ne senpripense uzu la vortojn “la sankta patro”, kiam vi parolas pri la papo.

1-e “Sankta Patro” estas la titolo de Dio mem en niaj preĝoj. Ĉu ni sen ridindigi nin povus preĝi: “Sankta Patro, ni petas Vin por nia sankta patro.”?
2-e La 2-a Vatikana Koncilio admonas nin ekspliki nian kredon per lingvo, kiu vere povas esti komprenata ankaŭ de la aliaj kristanoj. Kaj ili, same kiel ni, scias, ke …
3-e … papo ne estas pli sankta ol ĉiu alia baptito.
4-e Pli normale estus diri: “la papo”, same respektoplene estus diri: “nia estimata papo”, multe pli ĉarme estus diri: “nia kara papo”. Ĉu ne?

Kore salutas vin, Albrecht

---

La EEK okazos en Vroclavo, la naskiĝurbo de Dietrich Bonhoeffer. Pri Bonhoeffer kaj la ekumeno prelegetos Siegfried Krüger. Jen parto de lia prelegeto:

La protestanta teologo kaj rezistmovadano Dietrich Bonhoeffer naskiĝis 1906 en Vroclavo travivis ĉi tie la unuajn jarojn de sia infaneco. En la protestant-eklezia batalo Bonhoeffer engaĝigis sin kontraŭ la naziismaj “Germanaj kristanoj” kaj kontraŭ la enkonduko de la arjo-paragrafo.



Monumento honore al Dietrich Bonhoeffer antaŭ la preĝejo Sankta Elizabeto en Vroclavo.

En 1938 li aliĝis en la militaran rezistgrupon ĉirkaŭ Wilhelm Canaris kaj Ludwig Beck. 1943 li estis arestita kaj je la 9a de aprilo 1945 mortigita kiel konspiranto de la Hitler-atenco je 21.6.1944.

*“Mi devas havi la certecon esti en la mano de Dio kaj ne en homaj manoj”* (Dietrich Bonhoeffer). Tian certecon li esprimis en la unua strofo de la fama kanto “Sub ŝirm mirinda ...” en ADORU 490:

*Sub ŝirm' mirinda de potencoj bonaj*
*l'estonton kun trankvil' atendas ni.*
*Apudas Di' vespere kaj matene,*
*kaj ĉiun novan tagon sendas Li.*

**Kiel akvo volas esti mi.**

Kiel akvo volas esti mi,
plaŭdetanta en riveroj,
fluanta tra la praarbaro,
fekundiganta kampojn,
portanta ĉien vivon.

Kiel akvo volas esti mi,
kondukanta ĉiujn ŝipojn
kun homoj, ege pezaj ŝarĝoj,
al ili mildiganta
ilian lacon, penon.

Kiel akvo volas esti mi,
vera font' de ĉiu vivo,
unuiganta ĉiujn homojn
por kune, man' en mano
dividi ridon, larmon.

Bona Dio, akvo faru min,
elfluanta al vi rekte
por ĉie en la tuta mondo
plenumi volon Vian:
por frato esti homo!

De nekonata aŭtoro

prilaboris: Jacques Tuinder